

La printempa kaj somera kursprogramo de la Internacia Feria Altlernejo (IFA) de KCE

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.11.23

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-183/Radiokasedo-183-24-86-A-1141-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-printempa-kaj-somera-kursprogramo-de-la-Internacia-Feria-Altlernejo-de-KCE.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Jam nun estas ricevebla la programo de la kursoj, staĝoj kaj seminarioj, kiujn Kultura Centro Esperantista organizos en 1987. Ni prezentas al vi la aranĝojn, kiuj okazos en la printempo kaj somero de la venonta jaro. Vi povas peti la alsendon de la informilo, kiu anoncas tiujn kursojn, skribante al Svisa Radio Internacia.

A.- En majo, en la semajno de la 18-a ĝis la 23-a, okazos kurso enkonduka al la go-ludo. Instruos Karl-Ernst PAECH, germano, vicprezidanto de la Esperanto Go-Ligo Internacia kaj honora prezidanto de Eŭropa Go-Federacio. Li ludas goon jam de 1937 kaj gvidis kiel spertulo multajn go-kursojn. La okcidentanoj ĝenerale opinias, ke la plej altvalora tabula ludo estas la ŝako, dum jam depost 4000 jaroj la azianoj praktikas kaj atestas la ĉinan ludon GO (ĉine Wei-ch'i, koree Baduk), sed nun tiu ludo konkeras la tutan mondon kaj la ŝakmajstroj pli kaj pli opinias, ke la go-ludo estas la imperiestro de la ludoj; ĝiaj reguloj estas tre simplaj kaj lerneblaj per duonhora ekpraktiko. Tuj oni povas go-ludi kun plezuro, eĉ se majstrado bezonas longan praktikadon. La variada ebleco de goo estas 361, kio generas ciferon, kiu havus 760 nulojn, pli ol la suma nombro de ĉiuj atomoj en nia universo! Tio signifas, ke komputilo longe ne konkurencos la homan cerbon en tiu ludo, kiun vi havos la plezuron lerni kaj praktiki gvidate de kompetentulo.

Cl.- De la 6-a ĝis la 8-a de junio la pentekosta plilongigita semajnfino estos dediĉita al studo pri la arbaro. Instruos kaj gvidos la promenadojn Johann PACHTER, germano, diplomita forst-inĝeniero, estro de arbar-distrikto ĉe arbaro de Sigmaringen (ŝvaba ĵuraso). Jen iom pri la programo : malfermo per lumbildoj: Tipoj de arbaroj, 1-a promeno en la ĉirkaŭaĵo de KCE. Beleco de sana arbaro. Lumbilda konatiĝo kun arboj, plantoj, floroj, bestoj, maŝinoj, ktp. Problemoj kaŭzataj al la arbaristoj pro la arbar-endanĝerigoj. Diskuto. 2-a promeno en malsana arbaro. Surlokaj konstatoj, Diskutoj kaj solvo-serĉoj. Arbaraj floroj (kun lumbildoj). Por la laboro de arbaristo la floroj estas signodonantoj pri la grundo kaj ties karakterizaĵoj. Klarigoj. 3-a promeno en ekspluatata arbaro. Karakterizoj de la laboro en arbaro.

A.- Tuj post la pentekosta semajnfino titolita "En arbaro kun arbaristo" disvolviĝos la 3-a seminario pri la nomoj de sovaĝaj plantoj, tio de la 8-a ĝis la 13-a de junio. La gvidontoj de tiu aranĝo estas pastro Bernhard EICHKORN, germano, kaj Rudolf BOSSONG, nederlandano, prezidanto kaj sekretario de Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj. La celo de la seminario, kiu estas larĝe malfermita al ĉiuj natur-amikoj, estas matene interŝanĝi spertojn pri flaŭroj kaj kompletigi la nomenklaturon de sovaĝaj plantoj: posttagmeze viziti florriĉajn lokojn en belega ĵuraso ĉirkaŭaĵo; vespere ĝui pri lumbild-prelegoj pri floroj sovaĝaj kaj pri esperanto-aranĝoj.

Cl.- De la 13-a ĝis la 25-a de julio organiziĝos dusemaina esperanto feriado por infanoj kaj familioj. La celo de tiu aranĝo estas doni al familioj kaj geknaboj la eblon ek-, plu- kaj el-lerni esperanton kaj praktiki tiun ĉi lingvon en vivo-plenaj situacioj: ludoj, kantoj, manlaboroj, promenadoj, sportaj okupoj. Formiĝos grupoj laŭ la lingvaj kapabloj kaj laŭ la aĝoj, ke ĉiuj sentu sin en entuziasmiga etoso. La infanoj ĝis la 12-jaraĝo estu kun plenkreskulaj akompanantoj.

A.- De la 20-a ĝis la 25-a de julio okazos biologia semajno, kies studtemoj estos la simioj de Afriko kaj la prahomoj kaj la scienca nomenklature de bestoj kaj plantoj: la nuna sistemo kaj la alternativoj. Prelegos Wim DE SMET, doktoro pri zoologio, profesoro en la Nacia Universitato de Ruando en Butare, Ruando (Afriko); antaŭe departementestro en la Reĝa Belga Instituto por Natursciencoj kaj esplorgvidanto en la ŝtata Universitata Centro en Antverpeno, Belgio. En Afriko vivas kelkaj dekoj da specioj de simioj, inter kiuj la plej interesaj estas la ĉimpanzoj kaj la goriloj. Nuntempe en Ruando estas eble viziti grupojn de goriloj en ilia natura vivmedio kaj observi ilian konduton. En Centra Afriko vivis estaĵoj, kiuj havis homajn trajtojn, kaj kies skeletojn oni retrovas. Duono de la kurso pritraktos tiujn faktojn. La alia duono dediĉiĝos al nomenklaturaj problemoj, kies solvo tre verŝajne dependas de la ekuzo de esperanto.

Cl.- De la 11-a ĝis la 15-a de aŭgusto literatura stud-semajno havos la temon "legindaj libroj en esperanto ekster la belliteraturo." Instruos Ed BORSBOOM, nederlandano, instruisto de lingvo kaj literaturo en supera lernejo, metodologo kaj verkisto. Krom la pure beletraj verkoj ekzistas en esperanto granda vico da fascinaj libroj en modela lingvo. Ili apartenas al la ĝenroj de la biografio, memuaro, kolumno, vojaĝpriskribo, ktp. Pri ili okupiĝis elstaraj esperantistoj, kiuj scipovis majstre krei prozon. Konataj movaduloj sur tiuj terenoj estas inter aliaj PRIVAT, LUDOVIKITO (biografio), JUNG (memuaroj), ZAMENHOF (leteroj kaj proverboj), WARINGHIEN, BOULTON, PEREZ (eseoj), POTTS (infanlibroj), CSEH (kolumnoj), CART (gazetartikoloj), LANTI (pamfletoj), LINZ, DE HOOG (historiaj traktaĵoj), LAPENNA (paroladoj), DE DIEGO (recenzoj), SEKELJ (vojaĝ-priskriboj). Dum la kurso pritraktiĝos la plejmulto el ili pere de trastudo de karakterizaj tekstoj. La kurso havas enkondukan karakteron kaj volas konatigi precipe verkojn, kiuj donas altnivele distran kaj streĉan enhavon.

A.- De la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto disvolviĝos du traduk-kursoj al esperanto, unu el la franca lingvo, alia el la germana lingvo. Instruos Georges LAGRANGE, franco, kiu estas konata kiel unu el la plej kapablaj nuntempaj esperanto-tradukistoj kaj d-ro Dirk WILLKOMMEN, germano, profesia tradukisto, metodologo kaj redaktoro de la revuo "Esperanto Aktuell".

Cl.- Okazos aliaj kursoj, pri kiuj ni raportos post kelkaj semajnoj. Interesatoj petu tiun kursprogramon tra la kanalo de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Ĝis reaŭdo!